Kvaronjara **Bulteno** de la | Quarterly **Bulletin** of the

# Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto
# American Association of Esperanto Teachers

(Sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) (Branch of the International League of Esperantist Teachers)

Numero 187 ISSN: 0002-7499 majo 2011

## Enhavo

AATE Matters
- Jarkunsido 2011 ............ 1
- Ŝanĝoj en la Statuto de AAIE ............ 2
- Jar-raportoj
  - Vic-prezidanto ............ 2
  - Eduka Sekretario ............ 2
  - Kasisto ............ 2
  - Redaktoro de la Bulteno ............ 2
  - Per-koresponda Kursaro de E-USA ............ 2
  - Usona Ekzamena Servo ............ 3
  - Goldman-Fonduso de E-USA ............ 3
  - Kandidatiga Komitato ............ 3

Esperanto-klasoj en Usono ............ 4
From and about Our Members ............ 5
ILEI Matters ............ 5
Esperanto-Instruado Alilande ............ 5
Teaching and Learning via the Web ............ 6
Instru-sugestoj ............ 6
Calendar ............ 6
Course Report Form ............ 7
Membership Form ............ 8
Balotilo (Nepre Voĉdonu!) ............ 9

*Redaktoro*
Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara CA 93111-2521 USA
<dorothyjeanh@gmail.com>

*Prezidanto*
Ron Glossop <rglossop@mindspring.com>

*Vic-Prezidando / Bultena Formatisto / Retejestro*
D Gary Grady <dgarygrady@frontier.com>

*Eduka Sekretario*
Sherry Wells <esperantosherry@tm.net>

*Koresponda Sekretario*
Sally Lawton <slaw-o@crocker.com>

*Kasisto*
Chuck Mays <charles.o.mays@gmail.com>

**http://aaie.us**

AATE Matters

## Jarkunsido 2011

La jarkunsido de AAIE okazos dimanĉon, la 19-an de junio, de 2:30 ĝis 3:30 ptm ĉe la hotelo Woodfin en Emeryville, Kalifornio (inter Berkeley kaj Oakland kaj trans la golfo de San Francisko) en la kadro de la Kongreso de Esperanto-USA. La tag-ordo inkluzivos la jenajn temojn:

- Jar-raportoj de la prezidanto, la vic-prezidanto, la kasisto, la eduka sekretario, la koresponda sekretario, kaj la redaktoro de nia *Bulteno* (vidu la sekvajn paĝojn).
- Listo de niaj membroj.
- Raporto de la Kandidatiga Komitato pri kandidatoj por Prezidanto, Vic-Prezidanto, kaj Koresponda Sekretario, ĉiu por unu-jara deĵor-periodo.
- Voĉdonado pri ŝanĝoj en nia Statuto. (Vidu la artikolon ĉi-sube.)
- Voĉdonado pri vic-prezidanto, kasisto, eduka sekretario, kaj koresponda sekretario.

(If you cannot attend the annual meeting, you can still vote using the ballot on page 9.)

## Ŝanĝoj en la Statuto de AAIE

*de nia prezidanto Ron Glossop*

Dum la lastaj monatoj de la jaro 2010 AAIE aprobis per perpoŝtaj balotiloj gravan ŝanĝon en nia Statuto.

La nova angla vortumado de Sekcio V de la AAIE-Statuto nun estas: “Officers are President, Vice-President, Corresponding Secretary, Educational Secretary, Treasurer, and Editor. All (except the Editor) will be elected by the membership from among the members during an annual meeting for a three-year term which will begin at the end of the annual meeting of the year 2012 and every third year after that.”

En Esperanto la vortumado nun estas: “Postenuloj estas Prezidanto, Vic-Prezidanto, Koresponda Sekretario, Eduka Sekretario, Kasisto, kaj Redaktoro. Dum jara kunsido ĉiujn (krom la redaktoro) la membroj elektos de inter la tuta membraro por trijara deĵor-periodo kiu komenciĝos je la fino de la jarkunveno de la jaro 2012 kaj je ĉiu tria jaro post tio,”

Vi povas vidi la tutan Statuton ĉe <http://aaie.us/doku.php?id=statuto>.

**Two more changes in our By-Laws are now necessary:**

Ĉar ni faris tiun ŝanĝon en la Statuto, ni nun devus fari du aliajn ŝanĝojn.

(1) Sekcio VI nun diras: "LA ESTRARO konsistas el la redaktoro kaj la kvin elektitaj postenuloj, el kiuj ne pli ol tri estas elektitaj en la sama jaro. Iliaj devoj inkluzivas la jenajn:" Sed la nova situacio estas ke ni elektos ĉiujn kvin postenulojn ĉiujn trian jaron. Tial ni devas forstreki ĉiujn vortojn en la unua frazo post la vorto "postenuloj." Sekve la unua frazo iĝos: "LA ESTRARO konsistas el la redaktoro kaj la kvin elektitaj postenuloj."

ENGLISH: Section VI now says. "The BOARD consists of the editor and five elected officers, of which not more than three are elected in the same year. Its duties include the following:" But the new situation is that we will elect all five officers every three years. Therefore we must delete all the words in the first sentence after the word "officers." Consequently, the first sentence becomes: "The BOARD consists of the editor and the five elected officers."

(2) Sekcio VI.F. nun diras: "La prezidanto rajtas nomi unu sekciestron por trakti aferojn kun ILEI." La nova vortumado devus esti: "La prezidanto servas kiel la sekciestro por trakti aferojn kun ILEI."

ENGLISH: Section VI.F. now says: "The president may name a national representative to take care of ILEI matters." The new wording should be: "The President serves as the organization's leader to take care of ILEI matters."

**NEPRE VOĈDONU! BE SURE TO VOTE** (unless you plan to attend the annual meeting)! Vidu la balotilon sur paĝo 9.

# Jar-raportoj

## *Raporto de la Vic-Prezidanto*

Dum la pasinta jaro mia ĉefa laboro por AATE konsistis el

- verkado de rubriko pri Esperanto-instruado por *La Usona Esperantisto*
- helpo al Doroteo en la eldonado de la *Bulteno*
- respondeco pri nia retejo ĉe <http://aaie.us>

Mia deĵoro kiel vic-prezidanto finiĝos dum la jarkunsido en Emeryville. Poste, mi fariĝos la oficiala redaktoro de la *Bulteno*, kvankam Doroteo (kiu dum preskaŭ duonjarcento ne nur redaktis ĝin sed verkis la grandan plejmulton de la enhavo—tre ofte efektive la tuton!) kompreneble daŭre kontribuos.

*— Gary Grady, vicprezidanto*

## *Raporto de la Eduka Sekretario*

*(daŭrigo de la raportoj en la lastaj numeroj)*

En februaro, mi veturis tra Ohio, kun 3 rajdantoj, al Louisville por la Literatura Konferenco kun Duncan Charters, Humphrey Tonkin kaj aliaj. Ni lernis multe!

En marto, la Globalfest en Illinois estis bonega ! Eble 60 studentoj aŭdis pri Esperanto dum la 11 sesioj dum du tagoj. Dum unu sesio, unu persono kun studentoj de lia antaŭa altlernejo, demandas "Ĉu vi konas . . . kiu nun estas ĉe Champaign?" Mi ektelefonis mian filinon, kaj ŝi diris ke, mi scias la nomon, eble Darcy konas lin."

La ĉefestrino de la pola dancgrupo tie demandas de mi, post mi salutis la aŭskultantoj en la nomo de esperanto dum la granda kunveno, "Kiel vi ne scias, ke la kreanto de Esperanto estis de Polando?! "

En aprilo, mi alia foje instruis "Esperanto en Unu Horo-n" dum la Kongreso de Fremdaj Lingvoj Instruistoj de Ohio. Hazarde, la prezidanto por mia sesio, estis persono kiu ĉeestis en mia sesio la antaŭa jaro, kaj deziris kunveni kun ni en Washington DC, sed aliaj aferoj malpermesis. Lia edzino ankaŭ ĉeestis tiu ĉi sesion.

(En majo, Dro. Glossop kaj mi stabos la Rotary Esperanto stando en New Orleans kaj en junio, mi stabos la Esperanto stando en Charlotte NC ĉe la Unitariana Universalista Asocio kongreso. Ankaŭ, en junio, mi anticipos vizitanto de Ghana.)

*— Seri Uelz, eduka sekretario*

Sherry A. Wells
Michigan, Usono
esperantosherry@tm.net
248-543-5297

## *Raporto de la Kasisto*

Detala raporto estos prezentata dum la AAIE jarkunsido. Je la 1-a de majo, 2011, en la konto estas $2,810.43 post pagi al ILEI la jara kotizo. Ni havas 48 membrojn, inkluvize 20 dumvivaj membroj.

A detailed report will be presented during the AATE yearly meeting. As of the first of May, 2011, there is $2810.43 in the account after paying the yearly dues to ILEI. We have 48 members, including 20 life members.

*—Chuck Mays, Kasisto*

## *Raporto de la Redaktoro de la Bulteno*

Jen sumigo pri la pasintjara Bulteno-kosto, kiu restis preskaŭ senŝanĝa:

| Numero | Poŝto | Presigo | Entute |
|---|---|---|---|
| Majo 2010 #184 | $20.03 | $16.31 | $35.34 |
| Sep-Okt 2010 #185 | $19.45 | $13.05 | $32.50 |
| Jan 2010 #186 | $19.45 | $9.52 | $32.58 |

Denove tutkorajn dankojn al nia *Bultena* formatisto, D. Gary Grady, kiu zorgadis pri ĝia profesia askpekto kaj senerara enhavo!

Ek de 1964 estis mia plezuro redakti nian *Bulteno*-n. Tamen, finfine, post 47 jaroj, venas la tempo por transdoni tiun respondecon al iu pli juna kaj vigla. Do, mi ĝoje anoncas ke Gary konsentis esti la nova redaktoro, ek de la estonta numero!

*—Doroteo Holland, redaktoro*

## *Raporto pri la Per-Koresponda Kursaro de Esperanto-USA*

*de la 1a de marto 2010 ĝis la 1-a majo 2011*

Ĉijare entute aliĝis 2 novaj kursanoj, 3 finstudis kaj 97 teorie ankoraŭ lernas , kvankam la plej multaj ne aktivas. (Lastjare aliĝis 3 novaj kaj finstudis 1.) Jen la detaloj:

***Nivelo 1***: Neniuj novaj kursanoj aliĝis; finstudis neniuj kaj entute estas nun 57 kursanoj.

Fidele deĵoris kiel instruanto E. James Lieberman. (Potomac MD).

La lernolibro por ĉi tiu kurso estas *Jen Nia Mondo I*, kun 3 kompakt-diskoj.

Kurs-kotizo: $63, el kiu la instruanto rajtas ricevi $16.50 kaj la administranto $3.00.

***Nivelo 2***: Unu nova kursano aliĝis, 1 finstudis (Shari Webber-Dunn, Topeka KS), kaj nun 25 ankoraŭ lernas.

Instruanto: E. James Lieberman (Potomac MD).

La lernolibro por ĉi tiu kurso estas JEN NIA MONDO II kun 3 kompaktdiskoj.

Kurs-kotizo: $63, el kiu la instruanto ricevas $16.50; la administranto, $3.00.

**Nivelo 3**: Neniuj kursanoj aliĝis kaj unu finstudis. Lastperiode 2 aliĝis, kaj neniuj finstudis. Entute estas nun 4 kursanoj; lastjare, 5.

Instruanto: Doroteo Holland (Santa Barbara CA)

La lecionoj baziĝas sur la unua duono de *Vojaĝo en Esperanto-Lando* de Boris Kolker.

Kurs-kotizo: $73.75

**Nivelo 4**: Unu nova kursano aliĝis; unu (Shari Webber-Dunn, Topeka KS) finstudis ĉijare; neniuj lastjare; ankoraŭ restas 4 kursanoj. La administranto pretas instrui se venos novaj kursanoj.

La lecionoj baziĝas sur la lasta duono de *Vojaĝo en Esperanto-lando*. de Boris Kolker.

Kurs-kotizo: $73.75

Plejparte nur tiuj kiuj ne havas aliron al komputilo (ĉefe maljunuloj) interesas pri paperaj perkorespondaj kursoj ĉar kutime junuloj kiuj volas lerni Esperanton turnas sin al la reto (<edukado.net> kaj <lernu.net>).

**Financa raporto de la per-koresponda kursaro**

| | | |
|---|---|---|
| Saldo la 1-an de marto, 2010: | | $25.27 |
| Ricevitaj de E-USA | 45.50 | |
| *Bonhavo* | | *70.27* |
| Elspezoj: | | |
| Por poŝto de la administranto: | 7.16 | |
| Al kaligrafiisto (4 po $5) | 20.00 | |
| *Tutaj elspezoj* | | *27.16* |
| Saldo la 1-an de majo 2011 | | $43.11 |

*—Doroteo Holland, administranto*

## *Raporto de la Usona Ekzamena Servo*

*de la 1-a de majo 2010 ĝis la 1-a de majo 2011*

Haveblas ekzamenoj je tri niveloj: Komencgrada, Duagrada, kaj Supera. Informojn pri la enhavo de ĉiu nivelo oni povas ricevi kontraŭ peto al la administranto. Ĉar la instrukcioj por la administranto kaj la ekzameniĝonto estas en la angla lingvo, la ekzamenoj taŭgas nur por personoj kiuj scipovas la anglan. La kotizo por ĉiu ekzameno estas $10. Ĉiu kiu sukcesas ricevas oficialan atestilon. Eblas ekzameniĝi ie ajn iam ajn; ekzemple: Apud via hejmo (nur necesas trovi administranton kiu scipovas la anglan, kaj antaŭe sendu al la administranto ties nomon kaj adreson kaj dek dolarojn); ĉe Esperanto-kongreso (se oni antaŭe anoncas sin); aŭ ĉe lernejo kie oni instruas Esperanton.

Ĉiperiode 2 personoj ekzameniĝis per la Komencgrada Ekzameno:

Marie Tarailo (Chicago IL) - Sukcesis
Shari Webber-Dunn (Topeka KS) - Sukcesis kun honoro

Lastjare ekzameniĝis 4 per la Komencgrada Ekzameno.

Ĉijare 2 personoj ekzameniĝis per la Duagrada Ekzameno:

Sherry A. Wells (Royal Oaks MI): Sukcesis kun honoro
Darcy Ross (Lockport IL): Sukcesis kun honoro

Lastjare 2 ekzameniĝis per la Duagrada.

Neniuj personoj ekzameniĝis per la Supera Ekzameno ĉijare aŭ lastjare.

**Financa raporto de la Usona Ekzamena Servo**

| | | |
|---|---|---|
| Saldo la 1-an de marto, 2010: | | $467.20 |
| 4 kotizoj po $10 | 40.00 | |
| *Bonhavo* | | *507.20* |
| Elspezoj: | | |
| Por kaligrafio (4 po $5) | 20.00 | |
| Poŝto | 5.15 | |
| *Tutaj elspezoj* | | *25.15* |
| Saldo la 1-an de majo 2011 | | $482.05 |

*— Doroteo Holland, administranto*
<dorothyjeanh@gmail.com>; (805) 967-5241
5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara CA 93111-2521

Sub la aŭspicio de Esperanto-USA kaj Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto

[La internaciaj KER-ekzamenoj de ILEI-UEA estas tute en Esperanto; haveblas je du niveloj: B2 (”forta meznivela”) kaj C1 (pli supera); estas administrataj nur de Esperantistoj kiuj ricevis specialan trejnadon; kaj okazas nur ĉe Esperanto-kongresoj aŭ konferencoj. Aranĝas ilin internacia komitato rajtigita de ILEI.]

## *Raporto de la Goldman-Fonduso de Esperanto-USA*

En januaro 2001 Teuntje Goldman kreis ĉi tiun Fonduson per donaco de $15,000, honore al sia forpasinta edzo Thomas A. Goldman.

Ŝia celo estis provizi el la interezo monon por pagi al junuloj aliĝon al la perkorespondaj kursoj de ELNA (nun Esperanto-USA) kiuj baziĝas sur la lernolibro kaj kasedo “Jen Nia Mondo I & 2.” Temas pri Niveloj 1 kaj 2, la nunaj kotizoj por kiuj estas po $63.

Kiel administranto de ĉi tiu fonduso, estas mia devo reklami ĝin. Ĉar bedaŭrinde mi pasintjare ne tion faris, neniu junulo petis monon de ĉi tiu Fonduso. Sed mi provos en la estonta jaro reklami ĝin de tempo al tempo en la organoj de Esperanto-USA kaj de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto.

*— Dorothy Holland, administrator*

## *Raporto de la Kadidatiga Komitato*

Dankon al Gary Anderson kaj Elizabeto Dorcas, kiuj kun Chuck Mays konstituas la kandidatigan komitaton. Ankaŭ ni de-

vus danki al Ron Glossop pro lia granda helpo. La komitato serĉis kandidatojn por prezidanto, vice-prezidanto kaj koresponda sekretario.

Ni devas danki Sally Lawton, kiu dum multaj jaroj estis nia tre bonega koresponda sekretario kaj Gary Grady, la laborema vice-prezidanto dum la pasintaj du jaroj.

Ankaŭ ni dankas Doroteo Holland, kiu redaktas la AAIE bulteno dum jaroj kaj jaroj.

Bonvolu noti ke ĉar AAIE devus elekti ĉiujn postenulojn por tri-jara deĵora periodo, en 2011 la kandidatoj elektiĝis nur por unu jaro.

Jen la presento de la kandidatoj:

**Koresponda Sekretario:**

Doroteo Holland, inter aliaj aferoj estro de la Usona Ekzamena Servo kaj dum pli ol 40 jaroj redaktoro de nia *Bulteno*, bone konas la organizaĵon kaj ties membraron, kaj ŝi konsentis kandidatiĝi por la posteno de koresponda sekretario. Doroteo baldaŭ transdonos la respondecojn de redaktoro al Gary Grady.

**Vic-Prezidanto:**

Nia bona kandidato por vice-prezidanto estas Jeremy Aldrich.

Jeremy (Ĝeremio) ALDRICH estas instruisto en Harrisonburg, Virginio. En publika submezlernejo, li instruis pri Esperanto dum fremdlingva esplora kurso al centoj da gelernantoj ĉiujare. Li lastatempe iĝis Kunordiganto por Fremdaj Lingvoj en la Harrisonburgaj Publikaj Lernejoj. Li ankaŭ instruas universitatan kurson pri interkultura instruado en James Madison Universitato.

**Prezidanto:**

Ni estas bonŝanca ke Ron Glossop, la nuna prezidanto, kunsentis denove esti kandidato kiel AAIE-a prezidanto. Dankon al Ron por la granda laboro por AAIE ke li faras. Jen biografeto de Ron:

Ronald Glossop estas Prezidanto de AAIE ekde 2006. Li estas Profesoro Emerita ĉe Sud-Ilinojsa Universitato en Edwardsvilo (SIUE) kie li dum 35 jaroj instruis filozofion kaj la studadon pri paco. Ekde 1983 li ankaŭ instruis Esperanton ĉe SIUE kaj en kelkaj elementaj lernejoj. Li aŭtoris 3 librojn: Philosophy: An Introduction to Its Problems and Vocabulary (1974), Confronting War (1983, 4-a eldono, 2001), kaj World Federation? (1993). Monda Federacio?, la Esperanto traduko farita de Johano Rapley, aperis en 2001. Profesoro Glossop ankaŭ verkis multajn artikolojn por profesiaj revuoj. Ekde la jaro 2001 li estas Direktoro de la organizo “Infanoj ĉirkaŭ la Mondo,” retejo ĉe <http://icxlm.org>

**Nova Redaktoro de la Bulteno de AAIE:**

Gary Grady estos la nova redaktoro de la *Bulteno*. Ni bonvenigas lin kaj estas tre dankemaj havi tre kapablan personon en ĉi tiu posteno.

Finfine, mi tre dankas al Elizabeto, Gary kaj Ron pro la helpo trovi bonegajn kadidatojn.

*— Chuck Mays, komitatestro*

# Esperanto-klasoj en Usono

- Last February **Maria Murphy** taught Esperanto to 7 people at the Unitarian Church in **Englewood, Florida**, in preparation for their attending NASK classes in July.

- Beginning January 28, 2011, **Mar Cardenas** taught a 12-week Esperanto class at the Unitarian-Universalist church in **Chula Vista, California**, in preparation for the NASK course at the University of California in San Diego July 2-10.

- For two hours every Wednesday during the past year **Dorothy Holland** has guided two long-time Esperantists in **Santa Barbara, California**, in reading and appreciating the prize-winning novel *Homoj sur la Tero* by Stellan Engholm. Their next project will be reading the Esperanto translation of the original German *Grimm's Fairy Tales*, including comparing them with English versions.

- For the past several months the Esperanto group in **Raleigh-Durham-Chapel Hill, North Carolina**, area has been holding weekly conversation practice in Durham with guests taking part from as far away as New Mexico and Oregon via Skype video. More information on teaching Esperanto on-line video services will appear in future issues of the *Bulteno*.

## *NASK: North American Summer Esperanto Courses — July 2-10, 2011*

Agu nun por esti parto de la internacia studprogramo NASK ĉe la Universitato de Kalifornio, San Diego (UCSD). Ĉi-jare, NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto) konsistos el mallonga sesio de nur 9 tagoj de instruado, 2-10-an de julio, 2011. Restas ĉambroj en la apartamentejo. La limdato por registriĝo estas la 14-a de junio, do ne hezitu!

La kotizo, kiu inkluzivas individuan ĉambron kaj manĝojn, estas 895 USD (ĝi estas malpli ol duono de la pasintjara kotizo), kaj la tuta prezo por plentempaj studentoj kaj partoprenantoj de latin-amerikaj landoj estas nur $695!

Partoprenu en tiu ĉi unika kurso por profunde studi Esperanton kaj eĉ havi la tempon partopreni, interalie, la usonan feston de la Sendependec-Tago kun piroteknikaĵoj en la apuda urbeto La Jolla. Birke Dockhorn el Germanio, Bertilo Wennergren el Svedio kaj Lee Miller el Usono planas trinivelajn formalajn klasojn ĉiutage, kun kromaj aktivaĵoj en la posttagmezo kaj vespero. Hoss Firooznia, help-instruisto, gvidos ekskursojn kaj prizorgos la taĝurnalon, la NASK-an Faskon. Grant Goodall, profesoro en la Universitato de Kalifornio, San Diego, kaj direktoro de ties lingva fako, estros la kursaron.

Pli da detaloj kaj fotoj troviĝas ĉe http://esperanto.org/nask. Por informoj pri registriĝo, stipendioj ktp. kontaktu la administranton, Ellen Eddy, ĉe <eddyellen@aol.com>

*— Joel Amis*

# From and about Our Members

- Kun granda bedaŭro ni anoncas la morton de **Henry Studer** la 10-an de februaro, 2011. Li estis membro de AAIE ek de marto, 2009, kaj instruis agrikulturajn kursojn ĉe la Universitato de Kalifornio en Davis. Krome li estis aktiva en loka Esperanto-grupo en Davis dum multaj jaroj.

- **E. James Lieberman** (Potomac MD), kiu estas pensiita profesoro ĉe George Washington Universitato, ĵus finverkis la manuskripton de sia verko Inside Psychoanalysis: The Letters of Sigmund Freud and Otto Rank, kiu baldaŭ eldoniĝos. Gratulojn!

- **Humphrey Tonkin** estis la ĉefa parolanto ĉe festo la 12-an de aprilo en Novjorko por lanĉi reeldonon de anglalingva traduko kiun li faris de la Esperanto-verko de Tivadar Soros *Maskerado ĉirkaŭ la morto*.

- ***Neil Blonstein** (New York NY) sendis la jenajn interesajn informojn:*

"The entire English Wikipedia was translated into Esperanto by a 90% accurate, automated program in a few months time in 2010. (This is the best computer translation that has ever been done between any languages.)

"Prior to this automated program (Epo/wikitrans) over 130,000 Wikipedia existed by human translation articles and original articles in Esperanto.

"There are about 100 different language versions of Wikipedia. The largest, including this vast computer-generated programo, is now in Esperanto."

*La 28-an de aprilo, Neil skribis:*

"Ĉirkaŭ 50 mez-lernejanoj partoprenis programon ĉe UNO kadre de la unitara religio/filozofio…mi disdonis Esperanto-informilojn al la pliparto de la jnuloj….Signifa pocento de usonaj esperantistoj apartenas al la unitara eklezio kies mesaĝo de diverseco kaj toleremo similas al la sinteno de signifa numero de Esperantistoj…."

*La 11-an de februaro, Neil skribis:*

"Kun eble duono tajvananoj el la 40 homoj en la ĉambro de UNO mi partoprenis prelegon pri frua edukado (ĉefe pri 4 kaj 5 jaraj infanoj) kaj ĝia influo sur malriĉeco. La programo daŭris ĉirkaŭ 2 horoj hodiaŭ.

"Tri prelegantoj komparis la eduk-sistemojn de Svedio, Usono, Tajvano, kaj Honduraso….

"Mi preferis paroli unue pri mia sperto esti profesia elementa instruisto en usono kaj miaj pozitivaj scioj pri Skandinavio…

"…ĉe la fino mi havis okazon disdonu informilojn pri Espranto kaj havis plurajn personajn konversaciojn pri la bezono de Esperanto kiel Dua Lingvo kadre de internacia kompaaro de edukado…"

*Kaj la 24-an de februaro, li skribis:*

"Sekve de partopreno en renkontiĝoj pri Virinaj Rajtoj [Kunveno por Statuso de Virinoj) ĉe UN kaj 777 UN Plaza, 2 gvidantaj virinoj de Community Church of New York (kaj personaj amikoj) mallonge vizities la Esperanto/UEA Oficejon de Novjorko…

# ILEI Matters

Ĉiu membro de AAIE estas aŭtomate membro de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj tial ricevas ties trimonatan organon *Internacia Pedagogia Revuo*. La lasta estis eldono 11/1. Se vi jam pagis vian AAIE-membrecon por 2011 aŭ estas dumviva membro, vi devus esti ricevinta tion. En ĝi vi trovos la jenajn artikolojn, inter aliaj:

- Instruado de Esperanto en lernejoj de Renato Corsetti
- Raporto pri instrua vojaĝo al Ĉinio en 2010 de Ron Glossop
- Detaloj pri la 44-a ILEI-konferenco en Kopenhago 17-23 julio 2011
- Informoj pri la KER ekzamenoj

Se vi ne ricevis *IPR*-11/1, bonvolu kontakti la redaktoron de la *Bulteno* (Doroteon Holland), kiu havas kelkajn ekstrajn ekzemplerojn kaj do povos poŝti unu al vi.

Laŭ la nombro da membroj, AAIE rajtas have 4 "komitatanojn" (reprezentantojn) ĉe la ILEI-Konferenco. Ĉi-jare ili verŝajne estas Duncan Charters (la nuna ILEI-vic-prezidanto), Vilĉjo Harris, Chuck Mays, kaj Ron Glossop. Tiu lasta , kiel AAIE-prezidanto estas ankaŭ la estro de la Usona/Kanada Sekcio de ILEI.

# Esperanto-Instruado Alilande

- Thirty 13-14-year-olds studied Esperanto a total of 18 hours as a regular school subject during the 2nd semester this year in a high school associated with the Pedagogue Faculty of the Saitama University in Saitama, **Japan**.

- Sixteen students recently participated in a 22-lesson Esperanto course every Sunday in Remera (Ratshuro) **Uganda**.

- In Hanoi, **Vietnam**, one group of university students and another group of kindergarten teachers are currently studying Esperanto in preparation for hosting the International Esperanto convention there in 2012.

- Ten Scouts participated in an Esperanto work-shop during the annual meeting of the Esperanto League of Boy Scouts in **Burundy**.

- Several students who studied Esperanto at the Zamenhof Institute in Lome, **Togo**, have become Esperanto teachers there.

- Two intensive Esperanto courses were offered at the Gresillon Chateau in Saint-Martin d'Arce, **France**, from April 30 to May 7 this year.

- For over 20 years, more than 1,000 students have enrolled in courses in tourism and culture taught in Esperanto at the International Tourism and Culture Studies center in Bydgoszcz, **Poland**. Several hundred have earned a Bachelor or Master's degree.

# Teaching and Learning via the Web

## *Retaj Vortaroj*

Jen interesaj informoj el la artikolo "Vortaroj, vortaroj, vortaroj" en Usona Esperantisto 2011:1 de Steven Cybulski:

1. Reta vortaro bazita sur la Plena Vortaro haveblas ĉe <http://reta-vortaro.de>
2. Du vortaroj haveblas ĉe <http://lernu.net>:
   a. En la hejmpaĝo, kiu uzas malpli komplikan lingvaĵon ol Reta Vortaro kaj tial estas aparte taŭga por komencantoj…
   b. Bild-vortaro (De la hejmpaĝo klaku ĉe Lernado>Vortoj>Bildvortaro (Kiam oni movas la muskursoron al cifero, la Esperanta nomo de la apuda objekto aperas.)
3. Por trovi pri-komputilajn terminojn, iru al <http://kokmputeko.net>. Kvankam ĝi ne enhavas difinojn, ĝi havas tradukojn de tre multaj terminoj, kaj ligilojn al pliaj rimedoj…

## *Du Novaj Mallongaj Filmoj en Esperanto*

Du animaciaj filmoj en Esperanto (Ĉapeloj kaj Neĝuloj) de Simono Keith el Fort Collins, Kolorado, nun videblas ĉe <http://cxapeloj.blogspot.com>. (Averto: "Ĉapeloj" estas iomete maldeca.)

# Instru-sugestoj

AAIE-member Joe Blum sendis la jenan artikolon pri siaj instru-metodoj.

## *Kial lernado per avataroj plaĉas al mi.*

Unue, Alan Armbrust skribis tion pri niaj lecionoj:

"Joe Blum and I began working together in February of this year [2010]. I had set myself a goal to become conversant in Esperanto by the end of the calendar year and was looking for ways to achieve this end. The website for gefratoj.org mentioned online courses using conferencing software called Elluminate. I was familiar with the software because of a distance education program being coordinated by my wife and wrote to gefratoj.org expressing interest in joining a course. Although the organization wasn't holding classes anymore, Joe e-mailed me and we arranged to begin weekly one-hour sessions.

Since that beginning we've worked together by conversing, by working with word lists, by studying useful phrases, and by working together on translations of short passages by well known authors. This variety of teaching techniques seems to work well for both of us, providing us with ample to visit and get to know one another as well as help me achieve my goal. My confidence in reading, hearing and speaking Esperanto has grown steadily throughout the past months. I wouldn't say that I'll fully achieve my goal by the end of the year but I'll be much closer than when I began working with Joe. My thanks to him for his friendship and commitment."

Ni ankoraŭ kunvenas rete ĉiu-semajne kaj verkas la tradukojn de la lecionoj ĉe www.gelf.us. Tre plaĉas al ni tion fari. Se vi volas helpi, vizitu nin lunde komence je la deka vespere EDT. Uzu tion konekton: http://tinyurl.com/dragonjoe. La angla teksto de la priskribo komencas kun: "This LIFE SKILLS collection of 26 EPN-based blogs, conversations, and worksheets is ideal for Critical Thinking courses and upper-level debating teams in need of new subjects. As a lifelong teacher, arbitrator and toastmaster, Joe Blum, MA TESOL, manages to present current topics through contrasting avatars in a refreshingly different way."

Mi esperas fini la Esperantan version de "E:P:N rejŝo: kia estas la via?" verŝajne dum miaj lecionoj kun Katalin Kovats.

— *Joe Blum*

# Calendar

**Junio 2011**

*14* Deadline to register for **NASK** to be guaranteed lodging. Vidu paĝon 4.

*17-20* **Landa Kongreso de Esperanto-USA** en Berkeley, Kalifornio, apud San Francisko. ĉe Hyatt Summerfield Suites Hotel (previously named Woodfin Suites). <http://www.Esperanto-USA.org/retbutiko> Inkluzivos la jar-kunsidon de AAIE. (rglossop@mindspring.com)

**Julio 2011**

*2-10* **La Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK)** University of California San Diego (vidu paĝon 4).

*9-14* **8a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto** Santa Marcelina, São Paulo, Brazilo

17-23 **ILEI Konferenco** Kopenhago, Danio

*23-30* **96-a Universala Kongreso de Esperanto** en Kopenhago, Danio

[Aktuala listo de konataj E-aranĝoj daŭre konsulteblas ĉe: www.eventoj.hu]

# American Association of Teachers of Esperanto

COURSE REPORT FORM

INSTRUCTOR
Name Address ____________________________________________
Email address ____________________________________________

COURSE
Location ____________________________________________
Tuition cost __________________________________________
Level: Elementary_____ Intermediate______ Other_____________
Beginning and ending dates_______________________________
Number of lessons _______ Duration of each lesson ____________
Material used: Books______________________________________________________
Videos____________________________________________________________
Other_____________________________________________________________

STUDENTS
Number finishing course ________ Age range_____________
Previous language skills ______________________________________________________
Is the course shown in the student records? ___________
Was an AATE exam administered? ___________

FORMATION OF CLASS
Name of organizer__________________________________________________________
Publicity method used_______________________________________________________
Supplier of course materials__________________________________________________

COMMENTS OF INSTRUCTOR
Concerning publicity
______________________________________________________________________
______________________________________________________________________

Concerning materials
______________________________________________________________________
______________________________________________________________________

Concerning teaching
______________________________________________________________________
______________________________________________________________________

*Please return this form to:*

Sherry Wells
P.O. Box 1338
Royal Oaks, MI 48068

E-mail: <esperantosherry@tm.net>

# American Association of Teachers of Esperanto
## MEMBERSHIP FORM

Voting members consist of professional educators (either active or retired) who are interested in Esperanto, and non-professionals who teach, have taught, or intend to teach Esperanto.

NAME_______________________________________ PHONE (___)_______________

ADDRESS________________________________________________________________

CITY. STATE__________________________________________ ZIP _______________

E-MAIL ADDRESS__________________________________

I do not want the following information to appear in the AATE membership list:

___ My telephone number ___My e-mail address ___Other ________________

NAME & ADDRESS OF SCHOOL ___________________________________________

___________________________________________

Are you a professional educator? ___Yes, active ___Yes, retired ____No

**Memberships are for the calendar year.** If you join in the middle of the year, you will receive "Bulletins" previously distributed during that year. All AATE members are automatically members of the International League of Teachers of Esperanto (Internacia Ligo de Instruistoj de Esperanto) and receive their quarterly *Internacia Pedagogia Revuo*.

Please check one membership category below:

____ One year membership with publications by mail in paper form: $40

____ One year membership with publications via the Internet in PDF form: $20

____ Life membership with publications by mail in paper form: $80

____ Life membership with publications via the Internet in PDF form: $400

If a one-year membership, for what calendar year? 20___

___New ___Renewal Today's date:__________

I wish to give $________ as a donation to AATE.

**Make your check payable to "American Association of Teachers of Esperanto" or "AATE" and mail it with this form to Sally Lawton, 12 Stage Road, Westhampton, MA 01027**

# Balotilo

***Estas tre grave, ke vi voĉdonu aparte por la proponitaj ŝanĝoj en la Statuto, ĉar amendi la Statuton postulas, ke duono de la membroj voĉdonas kaj ⅔ el la voĉoj aprobu la ŝanĝon.***

## *1. Estraranoj*

Bonvolu noti: Ĉi-jare ni elektos tri postenulojn por 1-jara deĵora periodo. En 2012 ni elektos ĉiujn 5 postenulojn por 3-jara deĵora periodo.

*Por Prezidanto (1-jara deĵoro de junio 2011 ĝis junio 2012):*

_____ Ron Glossop [La nuna Prezidanto]

_____ ____________________________________*

*Por Vice-Prezidanto: (1-jara deĵoro de junio 2011 ĝis junio 2012)*

_____ Jeremy Aldrich

_____ ____________________________________*

*Por Koresponda Sekretario: (1-jara deĵoro de junio 2011 ĝis junio 2012)*

_____ Doroteo Holland

_____ ____________________________________*

*Write-in candidates must confirm that they are willing to serve.

## Proponataj Ŝanĝoj en la Statuto

<u>*Sekcio VI estu ŝanĝita*</u>
*de* “LA ESTRARO konsistas el la redaktoro kaj la kvin elektitaj postenuloj, el kiuj ne pli ol tri estas elektitaj en la sama jaro. Iliaj devoj inkluzivas la jenajn:”
*al* “LA ESTRARO konsistas el la redaktoro kaj la kvin elektitaj postenuloj. Iliaj devoj inkluzivas la jenajn:”
*angle de* “The BOARD consists of the editor and five elected officers, of which not more than three are elected in the same year. Its duties include the following:”
*al* “The BOARD consists of the editor and five elected officers. Its duties include the following:”
<u>*Sekcio VI.F estu ŝanĝita*</u>
*de* “La prezidanto rajtas nomi unu sekciestron por trakti aferojn kun ILEI.”
*al* “La prezidanto servas kiel la sekciestron por trakti aferojn kun ILEI.”
*angle de* “The president may name a national representative to take care of ILEI matters.”
*al* “The President serves as the organization leader to take care of ILEI matters.”

Mi ___ aprobas ____malaprobas la supre menciitajn ŝanĝojn en nia Statuto.

## *Instructions*

1. Put an unmarked envelope containing your ballot inside another one **showing your name and return address**. On the outside envelope **write BALOTILO**.
2. Mail your completed ballot to **Dorothy Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara CA 93111-2521** por ke ĝi **alvenu** antaŭ la 15-a de junio, aŭ kunportu ĝin al la jarkunsido